

Raport-modelo por Rezentantoj de ILEI por 2010

Bonvolu legi la aldonitajn konsilojn pri plenskribo. Limdato por raporti: 31 marto, 2011.

- **Se en via lando jam ekzistas instruista grupo aŭ asocio, bv. respondi ĉi tie:**

Nomo kaj mallongigo en Esperanto: _____

Nomo kaj mallongigo nacilingve: _____

Jaro de fondo: _____ **Jura statuso:** _____

Rilato kun Landa Asocio de UEA: _____

Ekz.: ĉu integra parto, en kunlaboraj rilatoj aŭ plene sendependa de ĝi?

Membroj fine de 2010: _____. (paperaj _____, retaj _____, aliaj (HM,DM) _____)

Bv. informi nin se vi havas enlandajn membrojn, kiuj ne apartenas al ILEI-internacia.

Kontaktiloj: Hejmpaĝo: _____ **Ret-adreso:** _____

Enlanda membrokotizo: _____

Estraro de la grupo: _____

Laŭeble aldonu retadresojn, adresojn kaj funkciojn.

Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj: _____

- **Se en via lando ne ekzistas instruista grupo, bonvolu respondi ĉi tie:**

Planoj por fondi instruistan grupon: _____

Uzu pli da spaco laŭbezone.

=== **Agado** ===

6 ĝis 10 linioj da klarigoj bonvenas; ligoj al pli longaj raportoj bonvenas.

Propraj aranĝoj dum 2010: _____

Aranĝoj de aliaj kie la grupo aŭ la reprezentanto aperis: _____

Propraj projektoj dum 2010: _____

Varba agado en Esperanto kaj nacilingve: _____

Konata E-instruado en via teritorio: _____

Nombro kaj aĝo de lernantoj, grado de oficialeco, uzataj lerniloj, daŭro, intenseco ks. Sufiĉas referenci al <edukado.net> se la instruado estas tie dokumentita. Se ne, tuj kompilu kaj sendu la informojn al tiu renovigita retejo!

Aliaj atingoj en 2010: _____

=== **Planoj fondi sekcion** ===

Ĉu vi havas kvin personojn pretaj membriĝi en la internacia ILEI? **JES/ NE**

Ĉu vi havas 5 personojn pretaj membriĝi en la internacia ILEI, sed kiuj pro ekonomiaj kialoj bezonus apogon de la Koleghelpa Kaso de ILEI? **JES/ NE**

Ĉu tiuj personoj ĉiuj loĝas samurbe, aŭ troviĝas diversloke? _____

Ĉu jam tiuj personoj kunvenis? Kiam? _____

Ĉu vi povos kunveni ilin por kune pretigi sekci-aligan peton? _____

Vidu ĉe www.ilei.info la petilon kaj gvidilon pri la fondo de sekcio. Tie videblas ankaŭ la Statuto kaj Regularoj de la Ligo, kune kun prezentoj de ĝia agado.

Se vi povos peti sekcian aliĝon, kiam tio povos okazi? _____

Ĉu vi bezonas helpon de ILEI en la peto-pretigo aŭ por fortigo de via grupo? **JES/NE**

Se jes, bonvolu detaligi: _____

Se vi ne progresis ĝis la stadio peti aliĝon, kiun helpon de ILEI vi bezonas por via agado, por ke vi povu peti aliĝon? _____

Enketila plenskribinto: _____

Ni antaŭdankas pro via kunlaboro raporti al ni. Ni memorigas vin, ke ĉiujara raportado estas laŭstatuta devo de ĉiu reprezentanto! Kiel ankaŭ la devo resti ĉiam membro de la Internacia ILEI.

Demandilo al reprezentantoj:

- Mi konscias pri la devo resti membro de ILEI, kaj kotizos por 2011.
- Mi konscias pri la devo resti membro de ILEI, sed petas helpon de la Koleghelpa Kaso de ILEI por kovri mian membrecon en 2011.
- Por kreskigi la agadon nialande, mi petas helpon el la Koleghelpa Kaso por la sekvaj kolegoj: _____

ILEI jam elektis kelkajn reprezentantojn, kiujn ĝi volas subteni el la Kaso por 2011. Se tiu estas vi, ILEI estos informinta vin, petante vian konsenton pri tio!

Pluraj el vi ne estis membroj de ILEI en 2010, Tial, vi fariĝis "Kontaktpersono" anstataŭ "Reprezentanto". Ĉiuokaze certu, ke se vi ne membriĝos en ILEI por 2011, vi ne plu povos esti reprezentanto, kaj ni serĉos novan kandidaton kaj grupon por reprezenti vian landon.

Tamen, ni fidas ke vi restos ligita kun ni! Kun bondeziroj por via agado, kaj deziroj je baldaŭa sekcio-fondiĝo.

ILEI

Anekso: Konsiloj por plenskribado.

Konsiloj por plenskribado de la enketilo:

La raporto de niaj sekcioj el 2009 konsultebblas en nia ILEI-retejo www.ilei.info sub "Instancoj/Sekcioj". Por 2010 ni aldonos raportojn de la reprezentantoj.

La sugestoj pri raporto-longo estas nur proponoj, skribu tiom multe aŭ malmulte, kiom vi povas aŭ volas.

Ni promesas, ke viaj respondoj, post redaktado estos publikigitaj rete, ne nur por la komitato kaj membraro, sed por ĉiu, kiu interesiĝas.

La lokoj markitaj per linio _____ estas la lokoj kie vi entajpu viajn respondojn, uzante pli da spaco laŭbezone. Daurigu aparte aŭ sube en la dokumento se la spaco malsufiĉas.

Bonvolu sendi la dosieron, en formato rtf aŭ doc aŭ pdf, al la agente sekretario, kopie al la prezidanto:

idahavasi@freemail.hu

stefan.macgill@gmail.com

La temlinio de via mesaĝo kun la alkroĉita dosiero komencu per "LSR10" kun aldono de via landnomo.

La formato estas rtf, por kiel eble plej vasta redakteblo. Bv. ne ŝanĝi la litertipon aŭ grandon. La litertipo estas Tahoma je 12pt, kio estas unikonformita, do kapablas trakti la Esperantajn supersignojn.

Tahoma estas vaste uzata; se vi ne ne havas ĝin, petu ĝin de ni, aŭ uzu Arial. Se vi ial ne kapablas krei unikonformitajn supersignitajn literojn, bv. uzi "x" post la koncerna litero – ne uzu malunikonformitajn 'solvojn'.

Ni celas per tio kiel eble plej aŭtomatigi la pretigon de la raporto, kaj kalkulas je via helpo – ILEI ja ne havas centran oficejon!

Ni sendas la enketilon en formato PDF. Tio estas ĉefe por ke vi kontrolu la aspekton de la dokumento en RTF. Bv. ne provi plenskribi la PDF dosieron.

Ankaŭ viaj opinioj pri la demandoj kaj formato de la enketilo bonvenas.

Antaŭdanke:

Ida Havasi, aganta sekretario de ILEI

Stefan MacGill, prezidanto de ILEI
